

El Bohem-Moravlando

Ekspozicio esperantista. La 1-an de junio lasta, U.S.A.E. en Brno aranĝis soian ekspozicion. En granda salono de „Arbeiterheim“, apud bela ĝardeno, kie la laboristaro havis feston, oni elmetis sur grandaj kartonoj ilustritajn poŝtkartojn, en nombro ĉirkaŭ 1000. Sur kelkaj tre grandaj tabloj kuŝis la literaturo de nia lingvo, konsistanta preskaŭ el ĉiuj gazetoj pure esperantistaj, kaj el tiuj kiuj enhavis gravajn artikolojn. Krom tio estis granda amaso de leteroj, poŝtkartoj, kaj aliaj objektoj rilataj al nia lingvo.

Tre granda geografia karto, farita de S-ro Pelant, altiris precipe la ĉeestantojn. Sur ĝi estis metitaj ĉiuj urboj, kie ekzistas esperantistoj; tiuj, kie ekzistas kluboj aŭ societoj, estis enringitaj per du ringoj. La urboj, kie eliras Esperantista gazeto, estis zonitaj per radioj (t. e.: Paris, Epernay, Szegzárd, Wien, Södertelge, Santander, Montreal, Hilversum kaj Filipopel). Tiu ĉi karto estis plej bona pruvo de l' dis vastigo de nia lingvo.

Al la Ekspozicio venis S-ro J. J. Süßmuth el Södertelge (Svedlando) por fari paroladon, kaj pruvi ke nia lingvo estas parolebla kaj vivanta. Ankaŭ S-ro J. Holub venis el Loučka por interparoli kun S-ro Süßmuth kaj alesti la feston. Je la 6-a horo, la ĉeestantoj estis ĉirkaŭ 800-1000, kiam trumpetisto eksignalis silenton, kaj S-ro Pelant iris sur tribunon, kaj klarigis ke venis S-ro Süßmuth el Svedujo, fa ronta mallongan paroladon en Esperanto.

Poste, S-ro Süßmuth suriris la tribunon, akceptite per longa apladdado, kaj li komencis paroli en Esperanto. S-ro Pelant tradukis ĉiun frazon en la lingvon Boheman. La parolanto laŭdis Esperanton, dank' al kiu li povis interparoli kun alilingvuloj, alportante al ili salutojn el samideanoj de Nord-Etyroppoo. Li montris la rapidan kreskon kaj floradon de Esperanto, parolis pri la Ekspozicio, kaj finis per la sekvantaj vortoj: «Esperanto signifas finon de la spirita baro inter popoloj; ĝi ne estas nova paĝo aŭ nova folio, sed ĝi komencas novan ĉapitron en la kulturhistorio de l' mondo.»

Sekvis granda aplaŭdo. Post la parolado S-ro Süßmuth estis demandata de multaj personoj per *komprenigisto Esperantista*.

La rezultato estis bonega. Multaj gazetoj raportis detale pri la Ekspozicio, el kiuj precipe «Rovnost».

Al ĉiuj estimataj Esperantistoj, kiuj helpis efektiviĝi tiun ekspozicion per sendado de poŝtkartoj k. t. p., la Unua Societo de Aŭstraj Esperantistoj sendas sian plej varman dankon.

La sekvintan dimanĉon (8-an de junio) estis aranĝita ankaŭ nova ekspozicio en bohema hotelo, kiun oni anoncis en la gazetoj kaj per verdaj afiŝoj. Sed pro la malbona vetero, tiu ĉi ne tiel bone pros peris, kiel la unua.

Oni decidis fari ankoraŭ unu en germana hotelo, kie S-ro Süßmuth faros paroladon germane.